# MONATE ĈE VI

Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.- Málaga

Nueva Ëpoca | Abril, 2004 | Nº 64

## SUMARIO

Rimarkoj/ Observaciones 2
Jubileo de Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) 3
Esperanto en la uragano de ideologioj 3
Por Esperanto en la Eŭropa Parlamento ! 5
Esperanto-televido 5
¿Sabes que... Ĉu vi scias ke... 6
Nova Libro pri terminologio ! 7
Proksimiĝas la limdato por la Internacia Literatura Konkurso EKRA 9
Se modificaron los estatutos 10
Estatutos/Statuto 11
Ekas la nova mandato de la Kortumo 23
Fonduso pro Esperanto jam plene funkcias 24
(El la Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj) 25
Ĉu la eŭropa dekstro mobilizita kontraŭ Esperanto? 27
Komercaj petoj kaj proponoj 28
Convocatoria II Congreso Mundial de la Poesía 31

Edita: Asociación Andaluza de Esperanto (AEU)
Depósito Legal: MA-1480/87. Imprime: La Reprografía, Málaga.
Redacción: Armengual de la Mota, 33-4º D, 29007 Málaga,Tel.: 656 407 198
Correo electrónico: andresper@teleline.es
http://www.andalucia-esperanto.tk

**RIMARKOJ/OBSERVACIONES**


De conformidad con la legislación actual sobre asociaciones vigente en España, hemos modificado el estatuto. En las páginas centrales, de la 11 a la 22 , tienes el texto completo. Lo hemos preparado todo de manera que puedas despegarlas del resto del boletín. Te recomiendo que las separes y las conserves. Se trata de un documento básico de nuestra asociación. Lo tienes en castellano y en esperanto.

También te invito a que leas detenidamente el resto del contenido de este número de Monate Ĉe Vi. Con ello conseguirás aumentar tus conocimientos , no sobre la gramática, sino sobre las implicaciones políticas, culturales y sociales del esperanto.

Hay que dotarse de argumentos para contrarrestar la estupidez de quienes se atreven a atacar nuestra lengua internacional con su ignorancia.

---

Akorde kun la nuna leĝaro pri asocioj reganta en Hispanio, ni modifis la statuton. En la mezaj paĝoj, de la 11a ĝis la 22a, vi havas la tutan tekston. Oni aranĝis ĉion tiel ke vi kapablu apartigi ilin. Mi konsilas vin disigi kaj gardi ilin. Temas pri baza dokumento de nia asocio. Tie vi havas ĝin kastilie kaj esperante.



Ankaŭ mi invitas vin legi lante la restaĵon de ĉi tiu numero de Monate Ĉe Vi. Per tio vi sukcesos pligrandigi viajn sciojn, ne pri ĝia gramatiko, sed pri la politikaj, kulturaj kaj sociaj implikaĵoj de Esperanto.

Oni devas provizi sin per argumentoj por bloki la stultecon de kiuj senrespekte atakas nian internacian lingvon per sia neklereco.

# Jubileo de Internacia Esperanto-Muzeo (IEM)

En tiu ĉi jaro Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) festas jubileon: Antaŭ 75 jaroj ĝi fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Estas unika fakto, ke Nacia Biblioteko oficiale vivtenas Esperanto-muzeon kaj Esperanto-bibliotekon. Pro tiu subteno IEM fariĝis la plej granda plene funkcianta biblioteko por Esperanto kaj Interlingvistiko, tute je la servo de esperantistoj kaj lingvistoj. ia elektronika katalogo (TROVANTO) estas alirebla pere de nia hejmpaĝo:

http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm

Okaze de tiu jubileo Austria Nacia Biblioteko organizos simpozion. Ni kore petas informi pri ĝi la esperantistojn de via lando. Ni prezentos dufoje la tekston en x-igita formo, por ke ĝi estu ĉiuokaze utiligebla rekte per kopiado: Unufoje ĉi-sekve kaj la duan fojon kiel informfolion en la aldonaĵo. Vi povas elŝuti la tekston ankaŭ el nia hejmpaĝo.

Tre koran dankon pro via kunlaboro

Helga Farukuoye, IEM

---

# Esperanto en la Uragano de Ideologioj

Internacia Esperanto-Simpozio en la
Aŭstria Nacia Biblioteko

La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 - 1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).
Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per "La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto". Esperanto do ne estas io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel kondutu la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?
Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko - la cetero disvolviĝos en Esperanto.
Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj.
(La germąna nomo de la aranĝo estas: Die gefährliche Sprache)
Partoprenkotizo: 50 euxroj, por studentoj kaj lernantoj 35 eŭroj. Aliĝo: plansprachen@onb.ac.at

Mag.Helga FARUKUOYE
Sammlung für Plansprachen und
Internationales Esperanto-Museum
der Österreichischen Nationalbibliothek
Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 WIEN
Tel.: 0043/1/ 535 5145

Internacia Esperanto-Muzeo
Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 VIENO

Homepage und Plansprachendatenbank TROVANTO:
Hejmpagho kun la elektronika katalogo TROVANTO:
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

# Por Esperanto en la Eŭropa Parlamento!

La eŭropa parlamentano G. Dell'Alba reprezentis hodiaŭ sub la numero "Dell'Alba A5 1543/04", sian amendon al la raporto pri multlingveco, Raporto 2003/2227 REG . Temas pri reenkonduko de la frazo forviŝita dum la antaŭa enkomisiona voĉdonado:

Ĝi tekstas (en grandaj literoj estas la reenmetita frazo):

Konsiderante ke la pripensado pri la plej bonaj rimedoj por konservi la malsamecon kaj la riĉecon kulturan kaj lingvan de Eŭropo devos daŭri, PRECIPE PER EKZAMENO ĈU LA PARALELA ENKONDUKO DE NEŬTRALA PIVOTA LINGVO, KIEL EKZEMPLE ESPERANTO, NE POVUS KONTRIBUI AL PLUKONSERVADO DE EKZISTANTAJ LINGVOJ, KAJ SAMTEMPE EVITI KE UNU AŬ LA ALIA DE ĈI TIUJ AKIRO ROLON NE NUR PLI GRAVAN SED TIAN, KE ĜI ENTUTE SUPERREGOS LA ALIAJN LINGVOJN.

fonto: ret-info

---

## Esperanto televido - Kion? Kiel?

Ĵaŭde finiĝis la eŭropa monkolekta turneo de Flavio Rebello, la iniciatinto de la retejo Ĝangalo kaj de nova projekto, celanta al fondo de esperantlingva reta televidstacio.

La prezidanto de UEA, Renato Corsetti, en vortoj subtenis la projekton, kvankam UEA donas nenian realan subtenon al ĝi. Aliaj forte dubas, ĉu ekzistas sufiĉa kvanto da entuziasmaj televidemuloj esperantistaj kun rapida ret-ligo por ke reklamantoj interesiĝu, kaj ĉu eblos produkti spektindan enhavon kun la limigitaj financaj rimedoj.

Artikolo kun s-ro Rebello legeblas ĉe: http://www.liberafolio.org .
el [nun]
---

fonto: ret-info
http://www.eventoj.hu

# ¿SABES QUE... / ĈU VI SCIAS KE...

***- el Centro de Esperanto de Braza (Congo), ha sido aceptado como centro de educación ?***

Dialundama Michel, prezidanto de Braza Esperanto-Centro, en la urbo Braza en Kongo, kontaktis instruajn instancojn de la ministerio pri edukado, kaj sukcesis pri tio, ke la Braza Esperanto-Centro estis akceptata kiel eduka centro ?

***- la lengua oseta es la 60ª en que se ofrece información sobre esperanto en la red Esperanto-net ?***

la Oseta lingvo igxis la 60-a, en kiu estas prezentitaj informoj pri Esperanto en la retejo Esperanto.net ?

la lingvo estas parolata de duonmiliono da homoj, ĉefe en Suda Rusio kaj Kartvelio, kie ekzistas naciaj respublikoj, nomataj respektive Norda kaj Suda Osetio ?


***- hace poco tiempo se publicó Amikeco, revista de jóvenes coreanos, vietnamitas, japoneses y chinos ?***

antaŭ ne longe aperis monata retgazeto "Amikeco" de koreaj, vjetnamaj, japanaj kaj ĉinaj junuloj ? La numeroj legeblas ĉe: http://www.syever.com/amikeco/03_tria/03_amikeco.html .

***- en la Universidad de Pekín se imparten clases de esperanto?***

en la Ĉina Universitato de Administro kaj Softvaro en Pekino, la 13-an de marto, 2004 startis E-kurson por komencantoj, en kiu partoprenas pli ol 80 gestudentoj el la Fakultato pri Turismo Internacia ?

La kurson gvidas s-ro Cui Jiayou, rete: cuijiayou@yahoo.com.cn .



# Nova libro pri terminologio!

Jux aperis libro de Jan Werner: "Terminologiaj principoj" KAVA-PECH 2004, 180 p., 14 x 20 cm.

La enhavo de la libro estas:

A. Ĝenerale pri faka apliko de Esperanto kaj pri terminologio
1. Kulturo de komunikado
2. Ĉu konflikto inter vorto kaj nocio?
3. Perspektivo de planlingvo en scienco kaj tehxniko
4. Apliko de Esperanto en la faka agado
5. Takse pri scienco, lingvo kaj terminologio
6. En Bad Saarow pri la scienca-teĥnika apliko de Esperanto
7. Terminologiaj instigoj el Bad Saarow
8. Nuntempaj tendencoj en la maniero de nomumado
9. Danĝero de pragmata sperto en terminologio de planlingvo

A. Terminologiaj principoj
10. Kompilante terminaron ni procedu kolektive
11. Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo
12. Stabiligo kaj normigo de terminaro
13. Antinomio de termina hejmeco kaj internacieco
14. Distingi kvalitojn en rilato de nocio kaj nomo
15. La klasifiko de nocioj
16. Difinoj en rilato al organizo kaj arangxo de terminara vortaro

C. Leksikaj observoj kaj instigoj
17. Nocio akompanata per nom-problemo
18. El la antaŭparolo al Matematika vortaro
19. Ĉu vere oblongo estas nekvadrata ortogramo?
20. Pri matematika termino grafo
21. Pri stuko kaj stukista metio
22. Terminologia analizo de la vortoj plafono kaj planko
23. Terminiga procedo en Esperanto. Pri la nocio truso
24. Pri la terminoj streno kaj streniĝo en la terminaro de IFEF
25. Kio estas tegmenta lukarno?
26. Terminologia sistemigo kaj klasifiko de flekse streĉataj konstruelementoj el [terminologio]

27. Pri balko kaj trovoj de Bernard Golden
28. Meditado pri konzolo kaj kantilevro
29. Kompletigu vian vortaron per laminato
30. Buldozo - ekzemplo de nekonvena nomo
31. Medite pri terlaboraj mainoj
32. Ni revenu al rekta kurento
33. Pri panel-diskuto
D. Prilingvaj konsideroj
34. Pseŭdoelementoj en Esperanto
35. Kunmetitaj vortoj estas elastsencaj
36. Pri la verba aspekto
37. Pri verbaj adjektivoj celaj kaj agaj
38. Diferencigo inter adjektivoj rilataj kaj kvalitaj

E. Esperanta terminaro de terminologia fako
Enkonduko
Terminaro
1. Lingvo kaj realo
2. Nocio
3. Klasifiko - rilatoj kaj nocio-sistemoj
4. Difinoj
5. Nomindikoj, formo de terminoj
6. Kreado kaj taksado de terminoj
7. Terminologia laboro
8. Terminologiaj produktoj
9. Terminologiaj datenoj
Uzita literaturo
Esperanta indekso

Pliaj informoj pri la libro troviĝas ĉe:
http://www.kava-pech.cz/u/oferto.htm .


Miroslav Malovec
Rete: malovec.starto@clavis.cz

## PROKSIMIĜAS LA LIMDATO POR LA

## INTERNACIA LITERATURA KONKURSO EKRA

Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev", Razgrad (Bulgario), anoncas internacian literaturan konkurson pri poezio kaj humuraĵoj, originale verkitaj en esperanto - "EKRA-2004", je libera temo.
La verkoj ne devas esti jam publikigitaj kaj partoprenintaj en aliaj konkursoj.

Verkojn por la konkurso, subskribitajn per pseŭdonimo, oni sendu en tri ekzempleroj al la organizanto (Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev", str. "Sv. Kliment" 48, BG-7200 Razgrad, Bulgario).
La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta koverto surskribita per la sama pseŭdonimo.



La ĵurio kunsidos la 3an de junio 2004. La premioj estos esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en revuo "Literatura Foiro" kaj " Esperantista tribuno" (Razgrad).

La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la esperanta kultura festo "Abritus-2004" en Razgrad, la 4-6an de junio 2004, organizota kunlabore kun LF-koop.

Por pliaj informoj:
Esperantista Domo de Kulturo "D-ro Ivan Kirchev"
str. Sv. Kliment 48
BG-7200 Razgrad (Bulgario)
tel. +359 84 28352

rete esperanto_razgrad £ mail.bg

---

Esta es la página de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.
**http://www.andalucia-esperanto.tk**

## SE MODIFICARON LOS ESTATUTOS

En la Asamblea General Extraordinaria de la asociación celebrada en Málaga el día 21 de de febrero de 2004 se procedió a la modificación, de conformidad con la Ley de Asociaciones Ley Orgánica 1/2002 de 22 de marzo, de los estatutos de esta asociación que a continuación se citan, quedando aprobada la nueva redacción por unanimidad de los socios presentes tal y como preceptúa el artículo 24 de los estatutos.

Artículo 11.- La Junta Directiva:
a) estará compuesta por un Presidente, un Vicepresidente, un Secretario y un Tesorero. También podrán existir diversos vocales, que estarán al frente de las comisiones que la Junta acuerde constituir. Asimismo se podrá nombrar un Vicesecretario y un Vicetesorero si se estima oportuno;
b) cuando algún miembro de la Junta Directiva cause baja por algún motivo en el período interasambleario, será sustituido hasta la próxima asamblea por el vice correspondiente o, de no existir, por un sustituto elegido por la Junta Directiva;
c) Las causas de cese de los miembros de los órganos de gobierno y representación serán la decisión libre del interesado de cesar en el cargo y la obstaculización habitual que perturbe gravemente la realización de los acuerdos tomados por dichos órganos. En cualquier caso, los ceses no serán válidos sin la ratificación de la Asamblea General.

Artículo 19.- El Tesorero dirigirá la contabilidad de la Asociación, tomará razón y llevará cuenta de los ingresos y de los gastos, interviniendo todas las operaciones de orden económico. Además recaudará y custiodará los fondos pertenecientes a la Asociación y dará cumplimiento a las órdenes de pago que expida el Presidente.
El Tesorero, junto con el Presidente, formalizará el presupuesto anual de ingresos y gastos así como el estado de cuentas del año anterior que deben ser presentados a la Junta Directiva para que ésta, a su vez, los someta a la aprobación de la Asamblea General. La fecha de cierre del ejercicio asociativo será el 31 de diciembre de cada año.

---

Esta es la página de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.
**http://www.andalucia-esperanto.tk**

# ESTATUTOS/
# STATUTO

ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO/

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

2.004

# ESTATUTOS DE LA
# ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO/ ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIGO

1.- Se constituye la Asociación Andaluza de Esperanto, Andaluzia Esperanto Unuigo en dicho idioma, que se regirá por los presentes estatutos y por la vigente Ley de Asociaciones.

2.- Son fines de la asociación el fomento, desarrollo y la enseñanza del idioma esperanto y coordinar las actividades de los grupos locales, poniendo todos los medios legales para alcanzar estos objetivos.

3.- El domicilio principal de la Asociación radicará en la ciudad de Málaga, calle Armengual de la Mota, 33 - 4°-D - Podrán ser creados locales sociales en otras ciudades mediante acuerdo de la Junta Directiva, la cual tendrá atribuciones para cambiar tanto el domicilio como los locales.

4.- La Asociación desarrollará sus actividades en Andalucía, tendrá duración indefinida y sólo se disolverá por acuerdo de la Asamblea General y por cualquiera de las causas previstas en la Leyes.

5.- La Junta Directiva será el órgano competente para interpretar los preceptos contenidos en estos estatutos y cubrirá sus lagunas, siempre sometiéndse a la normativa legal vigente en materia de asociaciones. Los presentes estatutos serán desarrollados y cumplidos mediante los acuerdos que válidamente adopten la Junta Directiva y la Asamblea General, dentro de su respectiva competencia.

6.- La Asociación Andaluza de Esperanto recoge la gran labor desarrollada por los esperantistas andaluces durante las primeras décadas de nuestro siglo y a tal fin propiciará y procurará editar obras en este idioma internacional.

7.- La Asociación pondrá especial atención en hacer participar en sus actividades a la juventud. A tal fin se constituye la Sección Andaluza de Jóvenes Esperantistas – Andaluzia Esperanto Junularo en el idioma internacional.

8.- La Asociación podrá editar, si las disponibilidades económicas así lo permiten, un boletín de información que sirva de exponente de las actividades que se lleven a cabo.

9.- La dirección y administración de la asociación serán ejercidas por el Presidente, la Junta Directiva y la Asamblea General.

10.- El Presidente de la Asociación asume la representación legal de la misma y ejecutar los acuerdos adoptados por la Junta Directiva y la Asamblea General , presidiendo las sesiones que celebren una y otra.

11.- La Junta Directiva:

a) estará compuesta por un Presidente, un Vicepresidente, un Secretario y un Tesorero.

También podrán existir diversos vocales, que estarán al frente de las comisiones que la Junta acuerde constituir. Asimismo se podrá nombrar un Vicesecretario y un Vicetesorero si se estima oportuno;

b) cuando algún miembro de la Junta Directiva cause baja por algún motivo en el periodo interasambleario, será sustituido hasta la próxima asamblea por el vice correspondiente o, de no existir, por un sustituto elegido por la Junta Directiva;

c) las causas de cese de los miembros de los órganos de gobierno y representación serán la decisión libre del interesado de cesar en el cargo y la obstaculización habitual que perturbe gravemente la realización de los acuerdos tomados por dichos órganos. En cualquier caso, los ceses no serán válidos sin la ratificación de la Asamblea General.

12 - Los cargos que componen la Junta Directiva serán gratuitos, se elegirán por la Asamblea General y durarán un periodo de 2 años, aunque pueden ser objeto de reelección indefinidamente.

13 - Es función de la Junta Directiva programar y dirigir las actividades y llevar la gestión administrativa y económica de la asociación, someter a la aprobación de la Asamblea General el presupuesto anual de ingresos y gastos, así como el estado de cuentas del año anterior.

14.- La Junta Directiva celebrará sus sesiones cuantas veces lo determine el Presidente o el Vicepresidente a iniciativa propia o a petición de cualquiera de sus componentes. Será presidida por el Presidente y en su ausencia por el Vicepresidente o el Secretario por este orden.

15.- Para que los acuerdos de la Junta Directiva sean válidos deberán ser adoptados por mayoría de votos de los asistentes. De las sesiones el Secretario levantará acta, que se transcribirá al libro de actas.

16.- Los miembros de la Junta Directiva presidirán las comisiones que la propia Junta acuerde constituir, con el fin de delegar en ellas la preparación de determinadas actividades o actos, o de recabar de las mismas informaciones necesarias. Formarán parte, además, de dichas comisiones el número de vocales que acuerde la Junta Directiva, a propuesta de sus respectivos Presidentes.

17.- El Presidente de la Junta Directiva tendrá además de las facultades consignadas en el articulo 10 las siguientes atribuciones:

a) convocar y levantar las sesiones que celebre la Junta Directiva y la Asamblea General, dirigir las deliberaciones de una y otra, decidiendo con voto de calidad, en caso de empate;

b) proponer el Plan de Actividades de la Asociación a la Junta Directiva, impulsando y dirigiendo sus tareas;

c) ordenar los pagos válidamente.

18.- El Secretario recibirá y tramitará las solicitudes de ingreso, llevará el Fichero y el Libro de Registro de Socios y tendrá a su cargo la dirección de los trabajos administrativos de la entidad.

19.- El Tesorero dirigirá la contabilidad de la Asociación, tomará razón y llevará cuenta de los ingresos y de los gastos, interviniendo todas las operaciones de orden económico. Además recaudará y custiodará los fondos pertenecientes a la Asociación y dará cumplimiento a las órdenes de pago que expida el Presidente.
El Tesorero, junto con el Presidente, formalizará el presupuesto anual de ingresos y gastos así como el estado de cuentas del año anterior que deben ser presentados a la Junta Directiva para que ésta, a su vez, los someta a la aprobación de la Asamblea General. La fecha de cierre del ejercicio asociativo será el 31 de diciembre de cada año.

20. - Incumbirá de manera concreta al Secretario velar por el cumplimiento de las disposiciones legales vigentes en materia de asociaciones, custodiando la documentación oficial de la entidad y haciendo que se cursen a la Autoridad las comunicaciones sobre designación de Junta Directiva, formalización del estado de cuentas y la aprobación de los presupuestos anuales.

21. - La Asamblea General, integrada por todos los socios es el órgano supremo de la Asociación y se reunirá anualmente con ocasión del Congreso Andaluz de Esperanto para aprobar el Plan General de Actuación de la Asociación, censurar la gestión de la Junta Directiva aprobar, en su caso, los presupuestos anuales

de ingresos y gastos así como el estado de cuentas correspondientes al año anterior.

22. - La Asamblea General se reunirá en sesión extraordinaria cuando lo exijan las disposiciones vigentes o así lo acuerde la Junta Directiva, en atención a los asuntos que deban tratarse y, en todo caso, para conocer las siguientes materias: disposición o enajenación de bienes, nombramiento de la Junta Directiva, solicitud de declaración de utilidad pública, modificación de Estatutos y disolución de la Asociación.

23.- Las Convocatorias de las Asambleas Generales, tanto ordinarias como extraordinarias, serán hechas por escrito, expresando el lugar, fecha y hora de la reunión.

24. - Los acuerdos de las Asambleas Generales se adoptarán por mayoría de votos. No obstante, será necesario el voto favorable de las dos terceras partes de los asociados presentes o representados, para adoptar acuerdos en Asamblea General sobre disposición o enajenación de bienes, nombramiento de la Junta Directiva, solicitud de declaración de utilidad pública, modificación de Estatutos y disolución de la Asociación.

25.- Podrán ser miembros de la Asociación Andaluza de Esperanto las personas que de alguna manera tengan interés en servir a los fines de la misma y sean admitidos por la Junta Directiva, la cual podrá otorgar el nombramiento de miembro honorífico y Presidente de Honor a las personas que estime oportuno, a título meramente honorario, sin que ello necesariamente lleve consigo la condición jurídica de socio.

26- La condición de socio:

a) se adquiere tras petición escrita a la Junta Directiva, que resolverá sobre la petición, no cabiendo recurso contra su acuerdo. En caso de admisión se trasladará al secretario, que procederá a la pertinente inscripción en el libro de socios. No se adquiere la condición de socio mientras no se satisfaga la cuota de entrada en la cuantía y forma que establezca la Junta Directiva;

b) se perderá por decisión propia del interesado o por un retraso superior a un año en el pago de la cuota. Igualmente causará baja cuando por causa grave así lo decida la asamblea.

27.- Los miembros de la Asociación Andaluza de Esperanto tendrán los siguientes derechos:

a) participar en las actividades culturales que promueva la Asociación y en los actos sociales que organice para todos los socios;
b) ejercitar el derecho de voz y voto en las Asambleas Generales;
c) ser nombrado miembro de la Junta Directiva en la forma que prevén los Estatutos;
d) poseer un ejemplar de estos Estatutos y tener conocimiento de los acuerdos adoptados por los órganos directivos;
e) que se les ponga de manifiesto el estado de cuentas de los ingresos y gastos de la asociación todos los años.

28.- Serán obligaciones de todos los socios:
a) acatar los presentes Estatutos y los acuerdos válidamente adoptados por la Asamblea General y por la Junta Directiva;
b) abonar las cuotas de entrada y las periódicas que acuerde la Junta Directiva;
c) desempeñar fielmente las obligaciones inherentes al cargo que desempeñen.

29.- La Asociación Andaluza de Esperanto carece de patrimonio fundacional. El limite para los presupuestos será de dos millones de pesetas.

30.- Los recursos económicos previstos para el desarrollo de las actividades sociales serán los siguientes:
a) las cuotas de entrada que señale la Junta Directiva;
b) las cuotas periódicas que acuerde la misma;
c) los productos de los bienes y derechos que le corresponda, así como los legados, subvenciones, donaciones que pueda recibir de forma legal;
d) los ingresos que obtenga la Asociación mediante las actividades lícitas que acuerde realizar la Junta Directiva, siempre dentro de los fines estatutarios.

31.-La administración de los fondos de la Asociación se llevará a cabo sometida a la corrrespondiente intervención y con la publicidad suficiente, a fin de que los socios puedan tener conocimiento periódicamente del destino de los fondos sin perjuicio del derecho consignado a este respecto en el apartado e) del artículo 27 de estos Estatutos.

32.- En caso de disolverse la Asociación Andaluza de Esperanto, la Asamblea General que acuerde la disolución nombrará una comisión de 3 miembros extraídos de los de la Junta Directiva, la cual se hará cargo de los fondos para que, una vez satisfechas las obligaciones el remanente, si lo hubiere, sea entregado a la Federación Española de Esperanto, para que los dedique a iguales, o en su defecto, análogos fines a los de la Asociación Andaluza de Esperanto

STATUTO DE

# ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO/

# ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

1.- Stariĝas la Asociación Andaluza de Esperanto, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la idiomo dirita, kiu reĝos laŭ la jena statuto kaj laŭ la reganta Leĝo pri Asocioj.

2.- Estas celoj de la asocio la progresigo, la disvolvo kaj la instruado de la idiomo esperanto kaj kunordigi la agadojn de la lokaj grupoj, aplikante ĉiujn leĝajn ilojn por la atingado de tiu celaro.

3.- La ĉefa asocia sidejo troviĝu en Malago-urbo, strato Armengual de la Mota, 33, 4° D. Estos eble starigi lokajn asociajn sidejojn en aliaj urboj per akordo de la Estraro, kiu rajtos ŝanĝi jen la ĉefan, jen la lokajn sidejojn.

4.- La Asocio agadu en Andaluzio, restos sen tempolimo kaj malfondiĝos nur laŭ akordo de la Ĝenerala Asembleo kaj pro ajna el la kauzoj difinitaj en la Leĝoj.

5.- La Estraro estu la instanco kompetenta interpreti la normojn de ĉi tiu statuto kaj plenigos ties makojn ĉiam laŭ reganta leĝaro pri asocioj. La jena statuto disvolviĝos kaj plenumiĝos per la akordoj kiujn adoptos valide la Estraro kaj la Ĝenerala Asembleo laŭ la respektiva kompetento.

6.- Asociación Andaluza de Esperanto reprenas la grandan laboron plenumitan de la andaluziaj esperantistoj en la unuaj jardekoj de nia jarcento kaj tiucele faciligos kaj klopodos la eldonon de verkoj en ĉi tiu internacia idiomo.

7.- La Asocio klopodu maksimume ke la junularo partoprenu en ĝiaj agadoj. Tiucele stariĝas la Sección Andaluza de Jóvenes Esperantistas- Andaluzia Esperanto-Junularo en la internacia idiomo.

8.- La Asocio kapablos eldoni, se la monrimedoj ebligas tion, informan bultenon kiu utilos kiel pruvo de la agadoj plenumitaj.

9.- La direktado kaj mastrumo de la asocio estos plenumitaj de la Prezidanto, la Estraro kaj la Ĝenerala Asembleo.

10.- La Prezidanto de la Asocio surprenas ties leĝan reprezentadon kaj realigias la akordojn adoptitajn de la Estraro kaj la Ĝenerala Asembleo, prezidante la kunsidojn de ambaŭ instancoj.

11.- La Estraro:
a) konsistu el unu Prezidanto, unu Vicprezidanto, unu Sekretario kaj unu Kasisto. Ankaŭ povos esti diversaj komitatanoj, kiuj regos la komitatoj kiujn la Estraro akordu estigi. Ankaŭ oni povos nomumi unu Vicsekretarion kaj unu Vickasiston se taŭge.
b) Kiam iu membro de la Estraro eksiĝos pro ajna motivo en la interasemblea tempo, lin anstataŭu ĝis la venonta asembleo la responda vic- aŭ, se li ne ekzistas, anstataŭanto elektita de la Estraro.
c) La kaŭzoj de eksiĝo de la membroj de la regad- kaj reprezentadinstancoj estu la memvola decido de la interesito eksiĝi el la posteno kaj la konstanta obstaklo perturbanta grave la realigon de la akordoj adoptitaj de la menciitaj instancoj. Ĉiukaze, la eksiĝoj ne validu sen la ratifo de la Ĝenerala Asembleo.

12.- La postenoj kiuj konsistigas la Estraron estu senpagaj, ilin elektu la *generala Asembleo kaj daŭru du jarojn, kvankam oni povos reelkti ilin ĉiam.

13.- Estu tasko de la Estraro programi kaj direkti la agadojn kaj klopodi la administrajn kaj ekonomiajn aferojn de la asocio, submeti al la ĝenerala Asembleo ĉiujaran buĝeton pri enspezoj kaj elspezoj, kaj la financan etaton de la pasinta jaro.

14.- La Estraro okazigu siajn kunsidojn kiam tion decidos la Prezidanto aŭ la Vicprezidanto el sia propra iniciativo aŭ el la peto de ajna membro de la Estraro. Ĝin prezidu la Prezidanto kaj, se li malestas, la Vicprezidanto aŭ la Sekretario en ĉi tiu ordo.

15.- La akordoj de la Estraro validos nur se ilin adoptas la plimulto de vocdonoj de la ĉeestantoj. Pri la kunsidoj la sekretario verku akton kiun oni kopiu en la protokol-libro.

16.- La membroj de la Estraro prezidu la komitatojn kiujn la Estraro mem

akordu estigi, por komisii al ili la aranĝon de konkretaj agadoj aŭ faroj, aŭ kolekti el ili informojn necesajn. Plie, konsistigu tiujn komitatojn la nombro de komitatanoj kiun akordu la estraro, laŭ propono de la respektivaj prezidantoj.

17.-La Prezidanto de la Estraro rajtu, krom tio notita en la artikolo 10, fari la jenon:
a) alvoki kaj finigi la kunsidojn kiujn okazigos la Estraro kaj la Ĝenerala Asembleo, direkti la interkonsiliĝon de ambaŭ instancoj, decidante per kvalit-voĉdono, se remise;
b) proponi la Agadplanon de la Asocio al la Estraro, impulsante kaj direktante la taskojn;
c) ordoni valide la pagojn.

18.- La Sekretario ricevu kaj pasigu la enir-petojn, sin okupu pri la Sliparo kaj la Ragistrolibro de Membroj kaj zorgu pri la direktado de la administraj taskoj de la asocio.

19.- La Kasisto direktu la librotenadon de la Asocio notu kaj prizorgu la enspezojn kaj la elspezojn intervenante ĉiujn ekonomiajn operaciojn. Plie. li kolektu kaj gardu la kapitalon de la Asocio kaj plunumu la pagordonojn de la Prezidanto.
La Kasisto, kune kun la Prezidanto, estigu la jaran budĝeton de enspezoj kaj elspezoj kaj konto-etaton de la antaŭa jaro kiujn estu prezentotaj al la estraro por ke ĉi tiu submetas ilin al la aprobo de la Ĝenerala Asembleo. La fermodato de la asocia periodo estu la 31a de decembro de ĉiu jaro.

20.- Koncernu, konkrete, la Sekretarion prizorgi la plenumon de la regantaj leĝoj pri asocioj, gardante la oficialan dokumentaron de la asocio kaj okupante sin pri la sendado al la Aŭtoritato de la informoj rilataj al nomumo de Estraro, estigo de financa etato kaj la aprobo de la jaraj budĝetoj.

21.- La Ĝenerala Asembleo, formita de la tuta membraro estas la suprema instanco de la Asocio kaj ĝi kunvenuĉiujare okaze de la Andaluzia Esperanto-Kongreso por aprobi la ĝeneralan Agadplanon de la Asocio, kritiki la administradon de la Estraro, aprobi, se dece, la jarajn enspez-kaj elspezbuĝetojn kaj la financan etaton de la antaŭa jaro.

22.- La Ĝenerala Asembleo kunvenu eksterordinare kiam tion postulos la regantaj normoj aŭ kiam tion akordos la Estraro en konsidero al la aferoj pritraktendaj kaj ĉiam por koni la jenon: dispono pri aŭ vendo de havaĵoj, nomumo de la Estraro, peto

de deklaro de publika utilo, modifo de la statuto kaj malfondiĝo de la asocio.

23.- La Alvokoj al la ĝeneralaj Asembleoj, tiel ordinaraj kiel eksterordinaraj, realiĝu skribe, montrante la lokon, la daton kaj la horon de la kunveno

24.- La akordojn de la Ĝeneralaj Asembleoj oni adoptu laŭ la plimulto de voĉdonoj. Tamen, estu necesa la favora vocdono de du trionoj de la membroj ĉeestantaj aŭ reprezentataj, por akordi en la Ĝenerala Asembleo rilate al la dispono aŭ vendo de havaĵoj, nomumo de la Estraro, peto de deklaro de publika utilo, modifo de la statuto kaj malfondiĝo de la Asocio.

25.- Rajtos membriĝi en Asociación Andaluza de Esperanto la personoj kiujn, iamaniere, interesas servi ĝiajn celojn kaj estis akceptitaj de la Estraro, kiu rajtos nomumi honora membro kaj Honora Prezidanto la personojn de ĝi ŝatataj decaj, nur honore, ne kunportante necese la juran ecaron de membro.

26.- La ecaron de membro:
a) oni alprenas post skriba peto al la Estraro, kiu decidu pri la peto, sen ebleco apelacii kontraŭe. Kaze de akcepto, ĝin pasigu al la sekretario kiu enskribu la personon en la membro-libro. Oni ne alprenas la ecaron de membro ĝis kiam la enirkotizo realiĝos kvante kaj forme laŭ akordo de la Estraro.
b) malestigas la decido de la membro mem aŭ la pli -ol -unujara malfruiĝo pagi la membrokotizon. La membro ellistiĝu ankaŭ kiam pro grava kaŭzo tion decidu la asembleo.

27.- La membroj de Asociación Andaluza de Esperanto rajtos:
a) partopreni en la kulturaj agadoj iniciatitaj de la Asocio kaj en la sociaj faroj aranĝitaj de ĝi por la tuta membraro;
b) kritiki kaj voĉdoni en la ĝeneralaj Asembleoj;
c) esti nomumita membro de la estraro laŭ la proceduro antaŭvidita en la statuto.
d) havi ezempleron de ĉi tiu Statuto kaj koni la akordojn adoptitajn de la direktinstancoj;
e) ke oni montru al li la etaton de enspezoj kaj elspezoj de la asocio ĉiujare.

28.- Estu devoj de ĉiuj membroj:
a) obei la jenan statutonkaj la akordojn valide adoptitajn de la ĝenerala Asembleo kaj la Estraro;

b) pagi la eniran kaj la periodajn kotizojn akorditajn de la Estraro;
c) plenumi honeste la devojn proprajn al la posteno tenata.


29.- Asociación Andaluza de Esperanto nehavas konstituan patrimonion. La limo por la budĝetoj estu du milionoj da pesetoj.

30.- La rimedoj antaŭviditaj por la disvolvo de la sociaj agadoj estu la jenajn:
a) la enirkotizoj fiksotaj de la Estraro;
b) periodaj kotizoj akordotaj de la Estraro;
c) la produkto el la havaĵoj kaj rajtoj apartenantaj al ĝi, samkiel la legacoj, subvencioj, donacioj riceveblaj leĝe;
d) la enspezoj obtenitaj de la Asocio per licaj agadoj kiujn la Estraro akordu realigi, ĉiam konforme al la statutaj celoj.

31.- La administrado de la financoj de la Asocio efektiviĝu submete al la responda interveno kaj kun sufiĉa publikeco, por ke la membroj povos koni periode la destinon de la kapitalo, sen damaĝo al la rajto notita tiurilate en la paragrafo e) de la artikolo 27 de ĉi tiu Statuto.

32.- Kaze de malfondiĝo de Asociación Andaluza de Esperanto, la Ĝenerala Asembleo akordanta la malfondiĝon nomumu trimembran komitaton el la personoj konsistigantaj la Estraron, kaj ĉi tiu prizorgu la havaĵon por ke, plenuminte la financajn devojn, oni liveru la restaĵon, se ĝi estas, al la Federación Española de Esperanto por ke ĉi tiu destinu ilin al celoj samaj, aŭ se manke, al analogaj al tiuj de Asociación Andaluza de Esperanto.

Esta es la pàgina de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.
**http://www.andalucia-esperanto.tk**



Edita: Asociación Andaluza de Esperanto (AEU)
Imprime: La Reprografía, Málaga.
Redacción: Armengual de la Mota, 33-4° D, 29007 Málaga, Tel.: 656 407 198
Correo electrónico: andresper@teleline.es
http://www.andalucia-esperanto.tk

# EKAS LA NOVA MANDATO DE LA KORTUMO

La 27an de februaro 2004 ekas la nova mandato de la Kortumo de la Esperanta Civito, kies membroj estas gecivitanoj Zofia Banet-Fornalowa, Jean-Jacques Lavanchy kaj Giorgio Silfer. C-ano Lavanchy estas nova kortumano: li anstatauas c-anon Leen Deij. La mandato ĉesos post du jaroj, en februaro 2006.

La Kortumo estas la arbitracia instanco, kreita de la Pakto la 10an de aŭgusto 1998. Ĝi estas do la plej antikva el ĉiuj Civitaj instancoj: la unua Parlamento kaj unua Konsulo naskiĝis Zamenhof-Tage 2001, kaj la unua Kapitulo la 26an de februaro 2002. Oni preskaŭ rajtas diri ke, en la juna demokratio de Esperantio, la justica povo naskiĝis iom antaŭ la leĝodona, kaj ĉi tiu iomete antaŭ la ekzekutiva. Sed fakte dum la unuaj jaroj la Kortumo ne plenumis justican povon: ĝia tasko estis interveni kiel paciganto okaze de konfliktoj inter la paktintaj establoj (fakte neniam, ĉar bonŝance ne okazis konfliktoj) kaj doni aŭtentan interpreton pri diversaj demandoj rilate al la Pakto kaj al la Konstitucio. Ĝi ankaŭ funkciis (kaj plu funkcios) kiel notario por la Senataj kandidatlistoj.

Laŭ la skemo funkcianta ekde la 10a de Aŭgusto, la Kortumon elektas la Forumo, nome la asembleo de la paktintaj establoj. Tial ke la Forumo fariĝis en 2001 unu el la du branĉoj de la Civita Parlamento, oni povas diri ke nur duono de la Parlamento elektas ĝin. Tiel ĝi restas tute sendependa de la aliaj du povoj.

Estas rimarkinde, ke la Kortumo decidas pri la akcepto de eksiĝo el la Pakto, kaj nur ĝi decidas pri eksigo. Male, la akcepto de nova paktinto apartenas al la Forumo. Inter la diversaj mensogoj disvastigitaj kontraŭ la Esperanta Civito estis ĝuste tiu, ke ne eblas retiriĝi de la Pakto.

Retiriĝi eblas, sed laŭ proceduro kiu garantias ĉiujn establojn: se ekzemple establo havus grandajn ŝuldojn al alia paktinto, nur la arbitracia instanco havus la forton reguligi la aferon antaŭ ol ĝia eksiĝo. Tial estas prava la rimarko: en la Civito estas du pordoj -- tra unu vi rajtas nur eniri, tra la alia nur eliri.

---

Esta es la pàgina de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.
**http://www.andalucia-esperanto.tk**


Krom arbitracii kaj autente interpreti normojn, la Kortumo estas vokita al grava tasko: prepari la Civitan Kodon, bazante sin sur la svisa. Tiucele la kortumanoj jam komencis labori, por ke la projekto (konsistanta el kolekto de la normoj kiuj diverghu de la svisa, pro la specifaj bezonoj de la Esperantlingva komunumo) estu preta ene de 2006. Tiel la nuna Senato povus diskuti kaj aprobi ghin, kaj la nova Senato, elektota en autuno 2006, startus sur kompleta jura framo.

---

## FONDUSO PRO ESPERANTO JAM PLENE FUNKCIAS

**La embrio de la Civita Banko estas finanta sian eksperimentan fazon. Fonduso Pro Esperanto estas jam administranta plurajn kontojn, perfektigante de tago al tago la mekanismon de eta, alternativa telematika banko.**

**Pormomente nur paktintaj establoj kaj individuaj Civitanoj rajtas esti klientoj. Sed ekde la 2a de junio 2004 ankaŭ la establoj rekomenditaj de paktintaj, kun kiuj ili estas en konstantaj komercaj rilatoj (ekzemple perantoj de LF-koop), rajtos havi propran konton en svisaj frankoj.**



**Interesa detalo estas ankaŭ la lingvo: la administrado de la fonduso fakte postulas tre klarajn terminojn, kaj pluraj vortoj el PIV (kaj el la Fundamento, nature), fariĝas pli oftaj ol kutime ĉe la klientoj. Tute komprenebla evoluo, ĉar ankaŭ pluraj terminoj el jura kaj politika sciencoj pli kaj pli uziĝas en Esperantio danke al la disvolviĝo de efektivaj demokratiaj povoj.**

**Por informoj: <fonduso £ esperantio.net>.**

# (El Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj)

Artikolo 7

1. Ĉiuj lingvoj estas la esprimo de kolektiva identeco kaj de specifa maniero percepti kaj priskribi la realon; tial ili devas havi la eblecon profiti la kondicojn necesajn por plena disvolvigo en ciuj funkcioj.
2. Ĉiu lingvo estas realaĵo kolektive elfarita kaj ene de komunumo ĝi fariĝas ilo de koheremo, identigo, komunikado kaj krea esprimivo, disponebla por la individua uzo.

Artikolo 8

1. Ĉiu lingva komunumo rajtas organizi kaj administri siajn monrimedojn kun la celo garantii la uzon de sia lingvo en ĉiuj sociaj funkcioj.
2. Ĉiu lingva komunumo rajtas disponi je ĉiaj necesaj iloj por certigi la transdonon kaj kontinuecon de sia lingvo.

Artikolo 9

1. Ĉiu lingva komunumo rajtas kodigi, unuecigi, konservi, disvolvi kaj promocii sian lingvan sistemon sen instigitaj aŭ truditaj perturboj.

Artikolo 10

1. Ĉiuj lingvaj komunumoj estas egalrajtaj.
2. La Deklaracio konsideras neakceptebla ĉiun diskriminacion kontraŭ lingvaj komunumoj bazitan sur kriterioj kiel ĝia grado de politika suvereneco, ĝia socia, ekonomia kaj ajna situacio, aŭ la nivelo de kodigo, aktualigo aŭ modernigo atingita de ĝia lingvo.
3. Por apliki la principon en la § 1 estas uzenda ĉia rimedo necesa por ke la egaleco estu efektiva.

# Peto pri la Esperanta Civitaneco

**Al establo**
**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**
**Armengual de la Mota 33 -4º - D**
**29007 Malago**
**Hispanio**

**Estimataj,**
**Laŭ la artikoloj 9 kaj 25 de la Konstitucio, bonvolu peri al la Civitana Registaro mian peton pri la esperanta civitaneco.**


**Se mia peto estas akceptita, mi konsentas disponigi al la matrikulisto la necesajn datumojn.**

**Dato:**

**Subskribis:**

**Adreso**

---




**AEU tiene la "civitaneco". Tu puedes pedirla individualmente, para ti, a través de la asociación.**

---

# ĈU LA EŬROPA DEKSTRO MOBILIZITA KONTRAŬ ESPERANTO?

De Bruselo al Parizo, la eŭropa dekstro ŝajnas mobilizita kontraŭ nia lingvo. Tion oni deduktas el du ĵusaj eventoj, pri kiuj cetere cirkulis kontraŭdiraj informoj. En la dua evento, estis miskompreno pri la nomo de ministro. En la unua, miskompreno pri la rezulto de voĉdono.

Ĉe la Komisiono pri konstituciaj aferoj de la EU-Parlamento, 17 mar 04, la raporto pri la perspektivoj de multlingvismo inkluzivis Eon, danke al la radikala deputito Gianfranco Dell' Alba. Sed amendo de la germana kristandemokrato Ingo Friedrich (parlamenta vicprezidanto) forigis tiun favoran mencion, per 14 voĉoj kontraŭ 12.



Aliflanke la franca ministro pri kulturo, Jean-Jacques Aillagon, en radiointervjuo ĉe France-Inter 15 marto 2004, sin esprimis kontraŭ Eo, fakte per la samaj argumentoj uzotaj de Ingo Friedrich du tagojn poste: laŭ ili nia lingvo estus senkultura.

Tial ke interpretistoj kaj tradukistoj el malpli konataj lingvoj al same malpli konataj (ekz. greka al dana) ofte apogas sin al la angla aŭ franca, nome atendas la tradukon al pli grava lingvo, la raporto Dall'Alba celis, ke tiun pivotan rolon povu plenumi Eo.

Ne temas pri la tipe finvenkisma strategio, laŭ kiu Eo estu la dua lingvo por ĉiuj, sed pri la sugesto, ke Eo estu ia helplingvo ĉe interpretistoj kaj tradukistoj. Tamen la diskuto estis ŝarĝita de politika signifo, ĉar duono de la komisionanoj kontraŭstaris la amendon, uzante ne teknikajn argumentojn, sed politikajn.
Probable se, anstataŭ diri Eo ne havas kulturon, oni rimarkus ke tiu rolo ne eblas por idiomo en kiu mankas la oficialaj EU-terminaroj, la malamikoj de Eo estus apenaŭ kontrasteblaj.

Pro tiu taktika eraro de la malamikoj, la diskuto enfokusiĝis pri "Havas aŭ ne kulturon". Kaj la fina rezulto havas pli gravan signifon politikan: nome, EU-instanco unuafoje devis sin esprimi formale pri Eo, kaj la instanco praktike duoniĝis inter poraj kaj kontraŭaj. Entute ĉeestis 26 deputitoj, kaj la negativa amendo pasis pro unu voĉo.

Estas interese, ke la malamika fronto estis gvidata de germana kristandemokrato, Ingo Friedrich. Tiu ĉi sinjoro en junio 2003 sendis saluton kiel vicprezidanto de la EU-Parlamento al la 80a Germana E-Kongreso. En tiu saluto li bedaŭris sian neĉeeston kaj, menciante ke kultura diverseco estas antaŭkondiĉo por paco, li aldonis: Eo estas vojmontrilo sur nia longa vojo al interkompreniĝo kaj integriĝo en malgrandiĝinta mondo.

Ingo Friedrich montris sin inklina al la argumentoj pri defendo kontraŭ lingva diskriminacio en dunganoncoj. Tamen post la ĵusa sperto, ni rimarkas ke tiu taktiko povas krei falsajn amikojn: ne estas perceptebla (ĉar efektive ankoraŭ tro distanca) la rilato inter batalo kontraŭ lingve diskriminaciaj dunganoncoj, unuflanke, kaj enkonduko de Eo en EU-praktikon,

---

# Komercaj petoj kaj proponoj

(uzu ankaŭ reklamejon je www.komerco.com !)

**Ĉinio**

En urbo Nanchang ni tre bezonas teknikistojn, kiuj bonkomprenas la maŝinojn pri cigaredofabrikado. Ni ankaŭ tre bezonas esperantistajn instruistojn, kiuj povas instrui la anglan lingvon. (venkon@nc.jx.cn)

Ĉina firmao volas aĉeti grand-dimensiajn torni-maŝinojn (Milling / Planer / Driling /Boring / Vertical-Lathes Machines) ne novajn, sed bonfunkciantajn, el bankrotitaj fabrikoj kaj uzinoj en ekssocialismaj landoj (Eŭropo) kaj aliaj. Kutime tiaj maŝinoj estas grandaj kaj pezaj (ĉ. kelkdek tunojn). Tiaj maŝinoj havas bonan merkaton en Ĉinio. Interesitoj turnu al la ĉina peranto de IKEF s-ro WANG Tianyi (Ĉielismo).

Rete: informo@komerco.com,
komerco@public.xa.sn.cn, esp@pub.xaonline.com, www.komerco.com, tel.: 0086-29-82242215, fakso: 0086-29-82262952.

**Irano/Japanio/Ĉinio**

Jen oferto de irana samideano kiu intencas eksporti pistaĉion (kuiritan). Ĉu vi pensas, ke pistaĉio havas merkaton en Ĉinio? Se vin interesas lia propono, unue bonvolu kontakti min.
Poste mi demandos la iranan samideanon rekte kontakti vin.
Yasuharu Maeda (Printempo), 464 Ryuganji, Tamana city, Kumamoto pref., 865-0061 Japan,
tel: +81-50-7509-6036, mobile: +81-80-3180-7379, HK WebFax: +852-2900-3396.

**Ukrainio**

1. Estas intereso pri suveniraĵoj el Sudameriko kaj Afriko. Bonvolu sendi fotojn de la specimenoj
2. Se en Afriko estas produktata kotono (krudaĵo), ni petas oferton ĉi teman.

Mikaelo Lineckij, UEA-Delegito por Kijivo (Ukrainio),
respondadreso: lineckij@ukrpost.net,
rezerva adreso esperanto@uafree.net.

**Uzbekistano**

Hotelo 'Esperanto' konstruota: partneroj kaj investantoj serĉataj.
Posedante grandan privatan domon kun vasta korto en bela vilaĝa ĉirkaŭaĵo de Samarkando, mi planas konstrui sur ties bazo (0,3 hektaro) tradicistilan moderne ekipitan 'B&B' hotelon nomotan 'Esperanto'. Tiucele mi jam arigis duonon de la bezonataj konstrumaterialoj kaj nun mi invitas interesitajn alilandajn partnerojn kaj investantojn por fondo de komuna entrepreno aŭ iu aliforma kompanio, kiuj nun ĝuas signifajn impostajn avantaĝojn en nia lando. Mi volonte gastigos ĉiujn interesitojn, kiuj povus surloke esplori eblojn de tiu ĉi interesa kaj reciproke profitdona projekto en la monde konata turisma centro.
Por pliaj informoj aŭ negocproponoj ne hezitu kontakti la posedanton: S-ro Holikberdi KOZIMOV, PULIMUGOB qishlog'i, Samarkand tumani, UZ - 704451 Samarkand viloyati, UZBEKISTANO,
retadreso: holikmam@mail.ru, imps@rol.uz .

---

Esta es la pàgina de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.
**http://www.andalucia-esperanto.tk**

## TUS CUOTAS DE SOCIO

**Ingresa tu cuota de socio en cualquiera de estas cuentas bancarias de la Asociación Andaluza de Esperanto e informa de ello a la Directiva por correo normal o electrónico:**

**En BBVA: 0182 4106 71 0207160 717**
**En Caja General de Ahorros de Granada:**
**2031 0225 54 0100187657**

**La cuota anual de socio para el año 2.003 es de 15 euros.**

***También puedes domiciliar el pago de la cuota. Para ello, si no tienes inconveniente, rellena la siguiente autorización e informa de ello a la Directiva de la asociación, así como a la entidad bancaria donde quieres que se abone el recibo correspondiente.***

---

**Sr. Director de Sucursal**

**Le ruego carguen en mi cuenta corriente/libreta de ahorros los recibos correspondientes a mi cuota de socio de la Asociacion Andaluza de Esperanto que ésta le presente al cobro.**

**El código completo de mi cuenta es:**
**Entidad Oficina o Sucursal D.C. Nº de cuenta**

**, a de de 2003**

**Firmado:**
**NIF:**
**Dirección:**
**Dirección del Banco/Caja:**

# CONVOCATORIA
# II CONGRESO MUNDIAL DE LA POESÍA

En el marco de la edición XXIV del la Fiesta del Fuego, a celebrarse en la Ciudad de Santiago de Cuba del 3 al 9 de julio del año 2.004, convocamos al Segundo Congreso Mundial de la Poesía, dedicado en esta ocasión a la memoria de los poetas haitianos Jacques Roumain, Jacques Stefan Alexis, Jacques Vieux y a Pedro Mir, Poeta Nacional de la Republica Dominicana, recientemente fallecido.

El Taller de Poesía del Caribe se ha enfrascado durante años en la búsqueda de un espacio común para los poetas de la diáspora caribeña, y por qué no, del mundo. En tal sentido comunicamos nuestra intención de lograr atraer en esta fecha lo mejor de la poesía antillana, por lo que nos anticipamos a augurar un hermanado encuentro lírico donde prime la solidaridad y el abrazo.




Por la importancia que le concedemos a este suceso hacemos extensiva esta convocatoria a los poestas de todo el planeta.
Seguros de contar con su presencia quedamos en espera de sus noticias.

Jesús Cos Causse
Presidente
II Congreso Mundial de Poesía
caribe@cultstgo.cult.cu

Casa del Caribe, Calle 13 No. 154, Vista Alegre, Zona Postal 4, Santiago de Cuba, CUBA

---

***N. de la R. - Se inter ni troviĝas poetoj, jen ŝanco partopreni hispane aŭ esperante.***




**SIDEJO DE ESPERANTOTUR EN BYDGOSZCZ, POLLANDO**

ESPERANTO KAJ TURISMO, JEN MIRINDA KAJ FRUKTODONA PARO